
# *Princo kun granda nazo*



IAM, ie estis brava kaj nobla reĝo kaj bela kaj gracia reĝino. Inter ili naskiĝis bela bebo. Tamen la bebo, reĝido, portis tre,... ne, tro grandan nazon. La malĝojaj gereĝoj invitis sorĉistinon, kaj petis ŝin malgrandigi la nazon de ilia filo.

La sorĉistino sorĉis la bebon kaj antaŭdiris, " Kiam la princo mem deziros malpli grandan nazon elkore, tiam la nazo estos malpli granda."

La reĝo kaj reĝino venigis el la tuta lando gevirojn kun granda nazo kiel nutristinojn kaj servistojn de la reĝido. La reĝido kreskis nutrate kaj servate nur de grandnazuloj. Knaboj kaj knabinoj kun granda nazo ankaŭ estis elektitaj el ĉiuj geknaboj en la lando kiel liaj geamikoj.

Kiam li fariĝis kreskinta junulo, li ekamis belan kaj ĉarman princinon. Li konfesis sian amon, kaj petis manon al ŝi. La princino akceptis lian proponon kaj konsentis fariĝi la estonta reĝino. La reĝido ĝojis kaj enbrakigis ŝin. Li kisis ŝin. Sed tamen li ne povis tuŝi ŝiajn lipojn per siaj lipoj malhelpate de la nazo. Li malamis la nazon unuafoje en sia vivo, kaj deziris anstataŭigi ĝin per malpli granda nazo elkore. Li lamentis en

la koro, “ Se mia nazo estus malpli granda, mi povus kisi ŝin! ” Ĝuste en tiu momento lia nazo malpligrandiĝis.

Okaze de la kunsido de *Societo de Esperantistoj en Sapporo*, la 27-an de julio, 2013, societanoj interparolis sub la temo — nazo.

En mia vico paroli pri la elstara organo sur la vizaĝo mi rememoris unu el miaj junaj amikinoj, kiu portas rektan kaj tre noblan, unuvorte, belegan nazon. Ŝi estas ungartistino. Ŝi estas ne nur artistino, sed ankaŭ, malgraŭ la juneco, administrantino de kvin salonoj de ungarto kaj direktorino de du faklernejoj de ungarto.

Rememorante ŝin, mi rakontis, ke junulinoj kun longaj kaj belkoloraj ungoj estas malfeliĉaj, ĉar tiuj belulinoj ne povas ĝui plezuron fosi sian nazon. Sed feliĉe, estas bona maniero purigi la naztruojn sen malpurigi la ungojn, la fingrojn kaj la vestaĵojn, eĉ se oni ne kunportas naztukon aŭ nazpaperon. Mi ankaŭ parolis pri tiu oportuna maniero.

Post kiam mi finparolis, mi rememoris, ke mi legis francan fabelon de princo kun granda nazo, kiam mi estis la tria-jara klasano de elementa lernejo. Mi parolis daŭre kaj aldone, kaj rakontis la fabelon laŭ la memoro.

Strange, la rakonto estas kaŝe konservita en mia memoro dum pli ol 50 jaroj.

3-a de aŭgusto, 2013

KIRIKAE H.